Esperantologio / Esperanto Studies **2** (2001), 49–52

Aperis ampleksa vortaro esperanta-germana

Ebbe Vilborg recenzas vortaron de Erich-Dieter Krause[1]

Aperis la granda vortaro esperanta-germana de Erich-Dieter Krause – verko longe atendata kaj arde dezirata, ĉar la samspeca antaŭulo, Butin & Sommer, *Wörterbuch Esperanto-Deutsch*, datumas de la 1950-aj jaroj. La kompilinto estas profesia lingvisto (profesoro pri la indonezia lingvo en la Universitato de Lepsiko) kaj leksikografo, jam konata en la esperantista mondo pro sia germana-esperanta vortaro de 1983. La aktuala verko estas tiel ampleksa (80 000 kapvortoj), ke oni, por trovi kompareblan objekton, devas sin turni al *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (*PIV*) aŭ al la *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana* de Wüster (1923–1929). Kiel laborkvanto plenumita de unu persono ĝi estas supermezura, klarigebla nur per diligenta kolektado kaj registrado dum pluraj jardekoj.

Aspekto

La verko sin prezentas en inda vesto: firma bindo malhele griza, tre klara preso (iom malgrandaj litertipoj); formato iom malpli granda ol A5.

Fontoj

La kompilinto donas dupaĝan liston de uzitaj fontoj (entute 71) – tre bona faro, tro ofte neglektita en esperantaj vortaroj. Sed la ĉefa fonto estas liaj sliparoj bazitaj sur tridekjara esploro kaj analizo de gazetoj, revuoj kaj beletro; krome materialo de radiodisaŭdigoj kaj leksemoj kolektitaj dum Esperanto-renkontiĝoj kaj konferencoj (p. XIII).

Principoj

La antaŭparolo nenion sciigas pri la principoj aplikitaj dum la ellaborado; ĝi impresas preskaŭ (*sit venia verbo*) kiel reklamteksto. Laŭ mia kompreno la gvida principo de Krause estis: trakti Esperanton strikte en la sama maniero kiel ajnan etnan lingvon. Tio signifas ke kelkaj informoj kiujn ni alkutimiĝis trovi en Esperanto-vortaroj mankas: ne troviĝas indikoj pri fundamenteco aŭ oficialeco de vortradikoj nek informoj pri Zamenhofa lingvouzo (la siglo *Zam* tamen aperas ĉe proverboj), eĉ ne pri eventualaj neologismoj. Tio ankaŭ signifas ke Krause atribuas al la vortoj vastan gamon de diversaj stilniveloj kaj uzoftecoj, kiuj ne ĉiam estas facile konstateblaj en la fakte uzata Esperanto: *derb* (kruda), *poet* (poezia), *pop* (populara), *salopp* (nezorga, senĝena), *selt* (malofta), *umg* (en la ĉiutaga lingvo), *vulg* (vulgara). Analoge la "mal-mal-vortoj" (mi prunteprenas la terminon de Jorge Camacho) estas traktataj

[1]Erich-Dieter Krause. *Grosses Wörterbuch Esperanto-Deutsch.* Hamburg: Helmut Buske Verlag, 1999. XIV + 882 pp. ISBN 3-87548-193-3. Prezo ĉ. 35 EUR.

diversmaniere. Kelkaj aperas simple sen indiko (*fajna, febla, frida, leĝera, obskura, magra, trista*), aliaj kun indiko *bes fachsprachlich* 'ĉefe faklingva' (*dura, liva, kurta*) aŭ *poet* (*olda, turpa*). Mankas *mava*.

Mi ne negas ke la aplikata metodo (sinkroneco, egaligo al etnolingvaj vortaroj) povas esti sukcesa ĉe prezento de Esperanto al neesperanta publiko.

Vortaranĝo

La kapvorta aranĝo estas tradicia laŭ radikoj. En la alfabeta ordo enestas ankaŭ mallongigoj (en abunda kvanto) kaj (pseŭdo)afiksoj (inĝenie markitaj per tripunkto: *bo…* prefikso, *…ist* sufikso). Por la prezentado de la materialo oni uzis kvar litertipojn: grasajn (kapvortoj kaj iliaj kunmetaĵoj), duongrasajn kursivajn (ekzemploj; transsendoj al aliaj kapvortoj), kursivajn (vortkategorioj; koncizaj klarigoj), normalajn (germanaj tradukoj de la esperantaj vortoj; pli longaj klarigoj). Ŝajnas preskaŭ superflue diri ke la formala traktado de la kapvortoj (difino de kategorioj, disdivido de sencoj, ktp.) estas senriproĉa.

Post la germana traduko sekvas informoj pri la rekcio[2] de la respektiva vorto (transitiveco aŭ ne-, kutimaj prepozicikomplementoj, ktp.). Ankaŭ la ekzemploj donitaj prilumas ĉefe tiun flankon de la vorto; ili do ne estas ĉerpitaj el literaturo aŭ aliaj citeblaj fontoj. Aperas tamen (post speciala signo) parolturnoj kaj proverboj kun germanaj ekvivalentoj. Venas la vico al kunmetaĵoj, ne sole al nuraj apudmetoj (*bank|konto*) sed ankaŭ kombinoj de adjektivo + substantivo (*bank|a sistemo*). Ili estas tre multnombraj; tiurilate tiu ĉi vortaro multe superas PIV.

La apudmetoj estas prezentitaj en jena ordo: (a) radiko + sufikso; (b) radiko + radiko; (c) prefikso + radiko. La Aĥila kalkano de tiu sistemo estas la kategorio (b): ĉu la koncerna vorto estu metita sub la unua aŭ la dua radiko? Krause elektis la unuan, laŭ mi ĝuste (dum en PIV "principe oni serĉu kunmetaĵon sub ĝia lasta radiko", vd. p. xxxii en tiu verko). Tamen ekzistas neneglektinda risko ke la leksikografo "forgesas" vorton kies unua ero estas komunuza, vastsenca radiko. Tiel ni trovas *akvofalo* sub *akvo*, sed *falakvo* (Z) ne estas trovebla sub *fali*; ĉe *homoseksuala* aperas la sinonimo *samseksama*, sed tiu vorto ne troviĝas sub *sama*; analoge mankas ekzemple *laktokafo* sub *lakto*, *pendponto* sub *pendi*, *sektero* sub *seka*. — Por la metado aŭ ne de la juntvokalo -*o*- ja ne ekzistas reguloj, sed kelkaj okazoj ŝajnas arbitraj: kial *dentoklako* sed *dentpasto*, *dentostumpo* sed *dentŝanĝiĝo*? Eble estus plej sekure meti [*o*] ĉe ĉiuj kunmetaĵoj, kiel oni faris sub *kafo*.

La sinonimiko estas bone prizorgita, sed la sinonimoj (kaj iliaj kvazaŭaj parencoj) aperas sub diversaj indikoj. La signo = montras de vorto malmulte uzata al alia ĝenerale uzata (*bitoko* = *bajto*; dube *Jamajko* = *Ĵamajko*, formo kiun mi neniam vidis). Suprendirektita sago referencas, laŭ la uzinstrukcioj, al kapvorto kie pluraj esperantlingvaj sinonimoj troviĝas, sed tio ofte ne okazas; praktike ĝi egalas al "vidu" (*Ejro* ↑ *Irlando*; *kribo* ↑ *kripo*, *asterio* ↑ *marstelo*). Cetere la signo estas tro fajna; mi, pro neekzakta vidkapablo, unuavide prenis ĝin por kruco kaj interpretis "arĥaika"! Sed tio ne sufiĉas; ofte sinonimo estas indikita per germana vorto: *subtila vgl dazu* (kp kun tiu) *delikata u* (kaj) *fajna*, *futbalo auch* (ankaŭ) *piedpilkado od* (aŭ) *piedpilkludo*.

[2]Gloso: *rekcio* 'kapablo de vorto ligi al si komplementon (objekton, prepozician esprimon)'; angle kaj france *rection*, germane *Rektion*.

Vortamplekso

Por ekhavi ideon pri la strukturo de la vorttrezoro en Krause mi komparis la kapvortojn sub la litero *j* en Wüster, PIV kaj Krause. Nombre ili estas preskaŭ egalaj: Wüster 180, PIV 160, Krause 190 (rondaj nombroj). La karaktero de novaj vortoj en la vortaro de Krause donas indikon pri la tendenca direktiĝo de la aktuala vortaro. Grandan grupon konsistigas geografiaj nomoj, ekzemple *Jangzi-rivero, Jemtlando, Johanesburgo, Jungfraŭo*. Aliaj estas sciencaj terminoj el botaniko (*jakinio, javibarbo*), kemio (*jodometrio, johimbino*), medicino (*jejunito*). Sed plej rimarkebla estas, por tiel diri, la "maleŭropigo" de la vortaro kun multaj neeŭropaj geografiaj nomoj kaj kun novvortoj ĉinaj (*juano*), hindaj (*jakŝio, jetio*), ktp.; Japanio estas reprezentata per la mallongigoj *JEI, JEJ, JLEI* kaj la freŝa termino *japanologio*.

Mi estas konvinkita ke tio kio plej impresas foliumanton de la vortaro estas la enorma kvanto de fakterminoj. La aparteneco al speciala fako estas indikita per facile kompreneblaj mallongigoj (*Biol, Chem, Ling, Phys*, ktp.). Latinaj fakterminoj estas aldonitaj en la fakoj *Bot, Zool, Med.* Kune la terminoj kovras multe pli vastan terenon ol la verkoj listigitaj en la bibliografiaj indikoj. La kompilinto sendube ĉerpis el aliaj fontoj, pri kiuj ni ne informiĝas. — En tiu konekso estas menciinde ke la datumprilaborado ŝajnas esti bone reprezentita (kun la siglo *EDV*: *elektronische Datenverarbeitung*). Tamen, sur la sojlo de la nova jarcento daŭre restas hezito pri fundamentaj nocioj: "*datenoj auch datumoj*", "*dataoj = datenoj*"; "*komputoro, häufig* (ofte) *komputilo*", "*komputero = komputoro*".

Tre bona estas la ideo senpere aldoni klarigon utilan al la ordinara leganto ĉe malpli konataj terminoj, ekzemple *frambezi|o* Frambösie eine tropische Krankheit (tropika malsano); *albin|o* Albino: Mensch, Tier oder Pflanze mit fehlender Farbstoffbildung (homo, besto aŭ planto kun mankanta pigmentkreado). Per tio la verko alproksimiĝas al la enciklopedieca karaktero de PIV.

Mankoj

Ĉu ekzistas iuj misoj kritikindaj? Nu, unu stranga trajto frapis min, nome la preskaŭ totala manko de virinaj (antaŭ)nomoj. Da viraj troviĝas ampleksa kolekto, de *Adamo* ĝis *Zakario*. Sed da virinaj? *Ann-* (z), *Elizabet-*, *Ev-*, *Kristin-*, *Mari-*: ĉiuj malĉeestas (sed *elizabetana* (*epoko*) ekzistas, kaj *Sankta Katarino* troviĝas – kiel insulo!). Enestas *valpurga nokto* sed ne *Valpurgo* mem. *Sofio* estas nur geografia termino. Eĉ ne la evidentaj formaĵoj per virina sufikso aperas: *Johano* sed ne *-ino*, *Paŭlo* sed ne *-ino*, *Vilhelmo* sed ne *-ino*. Ial Krause decidis ellasi la inojn; mi nur ne scias kial. (Oni notu ke virinaj nomoj estas bone reprezentataj en PIV kaj Wüster.) Bizare, tiu mizogineco trafis eĉ la antikvajn diinojn: ne *Artemiso* (sed ja *Apolono*), ne *Junono* (sed ja *Jupitero*), ne *Ateno* nek *Minervo*. Ĉu temas pri la problemo de la finvokalo ingenra? Sed Krause ŝajnas akcepti kaj *-a* kaj *-o* se juĝi laŭ la variantoj de la amdiino, la sola kiu trovis lokon en la vortaro: *Afrodita, Venuso/Venera/Venero*.

Inter vort(er)oj de mi serĉitaj sed ne trovitaj estas; *far* (prepozicio; nepre registrenda pro fakta ekzisto en la literaturo; ĝi estas en la *Plena Analiza Gramatiko* kaj la *Parnasa Gvidlibro*); *...it* (internacia sufikso por nomoj de inflamoj); *Kiribato* (ŝtato; en la suplemento al PIV), *raŭmismo* (esperanta ideologio multe diskutata dum la lastaj jaroj); *Raŭmo* ne troviĝas kiel geografia termino; ankaŭ *finvenkismo* mankas); *tera...* internacia prefikso por biliono; en PIV). Ĉe *Jugoslavio* mi sentas mankon de termino por la disfalo de la origina ŝtato, ekzemple *trunka Jugoslavio*. Ĉe la monernomoj mankas la internaciaj triliteraj mallongigoj.

Kelkaj eraroj kaj ellasoj kiujn mi hazarde renkontis: paĝindikoj mankas por p. V–VII; p. VI, dua alineo: *Plena Vortaro* estu *Plena Ilustrita Vortaro*; p. 187 enmetu (*n*) post Esperanto (germana); p. 192 *eŭpatorio*: lat. *Eupatorium*; p. 225 *fran|jo* malĝusta divido (kp. *panj|o* p. 546); p. 295 *Impressario* estu *Impresario*; p. 363 *koko*: *Gallinoformes* estu *Galliformes*; p. 432 *lineo*: *boralis* estu *borealis*; p. 464 *mega...*: *Suf* estu *Präf*.

Germana parto

Kiel negermano mi ne kapablas komenti pri la germana lingvaĵo. Sed eĉ eksterlandano facile rimarkas la abundecon de germanaj sinonimoj kaj variantoj, certe de granda utilo por tradukantoj. La vortaro konsideras la apartajn uzojn de la germana en Aŭstrio kaj Svislando. La nova oficiala germana ortografio estas aplikita.

Konkludo

La germanaj esperantistoj povas eniri la 21-an jarcenton apogataj de bonega vortaro. Cetere, estontece neniu esperantologo kiu pritraktas la esperantan leksikon povas preteratenti tiun ĉi verkon. Neniam antaŭe Esperanto prezentiĝis tiom kompleta kiom en la *magnum opus* de Krause.

Referencoj

M. Butin & J. Sommer

195? *Wörterbuch Esperanto-Deutsch.* Limburg/Lahn: Verlag der Limburger Vereinsdruckerei. [Sen jarindiko. Proksimuma aperjaro 1954.]

K. Kalocsay & G. Waringhien

1968 *Parnasa Gvidlibro.* Varsovio: Pola Esperanto-Asocio.

1985 *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto.* Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.

Gaston Waringhien (red.)

1987 *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Kun suplemento.* Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Eugen Wüster

1923–29 *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana.* Lepsiko: Ferdinand Hirt & Sohn.

Ebbe Vilborg estas filologo, docento pri la greka lingvo ĉe la Universitato de Göteborg, Svedio. Li membris en la Akademio de Esperanto 1962–1971. Li publikigis i.a.: *La participa problemo en la Akademio* (Göteborg 1973); *Etimologia Vortaro de Esperanto*, vol. 1–4 (Malmö 1989–1995); *Ordbok Svenska-Esperanto* (Malmö 1992).

Adreso de la aŭtoro: Prästgårdsängen 2, SE-412 71 Göteborg, Svedio.

Retadreso: vilborg@alfa.telenordia.se

Ricevita 2000 01 14. Akceptita 2000 02 22